

# LINGVO INTERNACIA

GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA JE LA NOMO DE L' KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por la jaro 1899:

Skandinavaj kronoj 2,00 = germanaj markoj 2,25 = frankoj 3,00 = rubloj 1,00 = portugalaj rejsoj 500 = brazilaj rejsoj 1000 = aŭstro-hungaraj kronoj 2,75 = cendoj 60 = ŝilingoj 2<sup>3</sup>/<sub>12</sub>.

Pago por anoncoj:

15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj — por duonpaĝa petittinio. 10 % rabato por duonjaraj. 25 % rab. por tutjaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: *Paul Nylén, Upsala, Sverige (Svedujo).*

Adreso de la administrado: *Ekspedejo de Lingvo Internacia, Luleå, Sverige (Svedujo).*

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro.

Pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la Ekspedejo.

N:o 11 (47)

la 10:an de decembro 1899

IV:a jaro.

## Impresoj post la ricevo de l' 1:a numero de nia gazeto por 1899 jaro.

Tutan jaron mi ne ricevis nian gazeton, ĉar mi jam longe vivas en dezertaj marĉoj de S.-Peterburga gubernio (okupante min per termezurado) kaj preskaŭ tute ne povas komunikiĝi kun iu. En tuta tiu ĉi tempo mi preskaŭ ne ricevis eĉ leterojn kaj ne tralegis eĉ unu linion de ia gazeto. Unuvorte, mi vivis kiel la Robinson sur dezerta insulo. Kaj subite mi ricevis numeron de nia gazeto, kiu iel atingis min, trairinte multajn lokojn, kie mi vivis en tiu ĉi jaro de mia migranta vivo. Oni povas kompreni, kiom mi estis ĝojigita per la ricevo de tiu ĉi numero de nia gazeto. Mi estis tiom ĝojigita, kvazaŭ mi post longa disiĝo renkontiĝis kun mia plej amata malnova amiko. Ne ricevante iajn sciigojn pri nia kara afero, mi ofte pensis pri ĝia sorto kaj revis pri tio, kiel multe paŝis antaŭen nia afero. Mi revis pri tio, kiel post longa izola vivado mi revenos en la konstantan lokon de mia loĝado, kiel mi ricevos per unu fojo multe da numeroj de nia gazeto kaj kiom da ĝojigantaj sciigoj pri sukcesoj de nia afero mi ricevos. Per tremantaj manoj mi disŝiris la bandeloron de la ricevita numero kaj ekrigardis la gazeton. Mia koro ĝoje ekbatiĝis: en miaj manoj estis malgranda numereto, duoble pli malgranda ol antaŭaj numeroj de la gazeto. Ĝi estis signita per 25-a de Julio. Laŭ tio ĉi mi konkludis: nia gazeto, kredeble, reformiĝis kaj nun aperas kelkfoje en la monato; kredeble, ĝi fariĝis ĉiusemajna; gloro al Dio! Sed kiam mi komencis legi la gazeton, mi subite konfuziĝis: mi estis hontigita kaj dolore ofendita. Mi tuj komprenis la aliformiĝon de la gazeto. Mi komprenis, ke tiu ĉi aliformiĝo de la gazeto estas ne ĝia pliboniĝo, sed ĝia degenerado, ĝia malsano, preskaŭ ĝia morto. Mi eksentis tion, kion mi eksentus, se mia plej kara, plej estimata amiko, kium mi esperis baldaŭ ekvidi kiel gloran bonfaranton

por la tuta homaro, subite montriĝis ordinara surstrata vaganto, malforta, malsana, malsobra kaj vestita per ĉifonaĵo. Kaj kiel ironie eksonis por mi la vortoj, per kiuj la redakcio finis sian antaŭirantan artikolon: "Esperanto vivu, floru, kresku!" Legante tiujn ĉi vortojn, mi kvazaŭ ekvidis morte vunditan homon, kiu senforte kuŝas sur la tero, naĝante en propra sango, fanfaronas pri sia batalo kaj minacas sian malamikon, kiu forte staras kaj mal-estime rigardas lin. Mi ekmemoris ankaŭ rusan ŝercan proverbon: "Kiel onklo batas fraton, ke al onklo polvo flugas!"


Jes, tielaj faktoj povas tute sanigi tro fervorajn revantojn kaj projektantojn. Kiom ridindaj montriĝis al mi miaj propraj revoj kaj projektoj kaj ankaŭ la projektoj de multaj niaj amikoj. Mi pensis: jen, ni projektas diversajn grandajn kaj multekostajn entreprenojn: naciajn esperantistajn gazetojn, ilustritajn eldonojn, grandegajn propagandilojn; ni projektas prezenti nian lingvon en tutmondaj ekspozicioj, konstrui hotelojn speciale por esperantistoj, kaj, kredeble, baldaŭ iu projektos konstrui fervojon speciale por esperantistaj vojaĝoj, kaj ĉe tuta tio ĉi ni ne havas fortojn eĉ sufiĉe subtenadi nian malgrandegan, malmultekostan esperantistan gazeton, nian plej ĉefan interligilon, sen kiu ni neeviteble disiĝos en la mondo, kiel plenmano da polvo, forgesos unu la alian kaj fine forgesos kaj pereigos por ĉiam nian karan aferon, por kiu ni jam multe laboradis kaj ne malmulte atingis. Nia komuna esperantista gazeto estas ja plej ĉefa kondiĉo de nia vivo kaj sukceso. Sen propra, familia, kvankam malgranda, sed fortike staranta kaj regule aperanta gazeto, estas tute ne ebla nia laboranta familio. Sen komuna reciproka vigligo, subtenado, kuraĝigo ni ja tute ne povas sukcese labori, ĉar en la mondo ĉio staras kontraŭ ni, kaj nia laboro estas tre malfacila.

Tial mi kore kaj humile petas niajn amikojn — esperantistojn: lasu nun ĉiajn projektojn, ĉiajn disputojn kaj eĉ propagandon; lasu ĉion kaj antaŭe garantiu por ĉiam nian gazeton, nian karan interligilon, sen kiu nia afero mem ne povas ekzistadi, sen kiu ni ne povas labori kaj iam atingi nian celon. Ni devas memori, ke ĉia eĉ plej malgranda ĉesado de nia gazeto alportas grandan malbonon por nia afero, kaj la duonjara ĉesado de la gazeto, kiu okazis en la nuna jaro, sendube pereigis pli multe, ol ni povas atingi per plej fervora dujara laborado.

Karaj amikoj! neniam forgesu, ke la sukceso de nia laboro kaj la tuta sorto de nia afero estas nedisŝireble kunligitaj kun la sorto de nia familia esperantista gazeto. kaj sekve, nia gazeto devas esti por ni tiom kara, kiom kara estas por ni nia komuna ideo.

Novembro 1899.

M. S. Rakitski.



## Novajoj.

**Societo "Espero".** En la pasinta monato oktobro la komitato de la societo "Espero" ricevis leteron de s-ro de Kanaloŝi-Lefler, per kiu li rifuzas esti prezidanto de "Espero" (li ne nomis la motivon). Tiu fakto igis la komitaton inviti la membrojn de Espero al komuna kunveno je 6/18 de novembro por elekti novan prezidanton. La komitato dissendis preskaŭ 400 invitojn por la kunveno al ĉiuj esperantistoj peterburgaj kaj al multaj redakcioj gazetaj, ĉar antaŭ la kunveno s-ro F. Postnikov intencis tralegi la raporton pri "la nuna stato de l' demando pri lingvo internacia".

En la difinita horo venis iom da publiko kaj (bedaŭrinde) tre malmulte da esperantistoj. S-ro Postnikov legis sian raporton dum preskaŭ 1½ horoj; la finaĵoj li ilustris per portretoj sur ekrano. La elekto de prezidanto ne efektiviĝis, ĉar multaj esperantistoj ne venis. Tial la Kunveno esperantista estis prokrastita ĝis la 14/26 de novembro.

En la sekvantaj tagoj post la kunveno 5—6 gazetoj peterburgaj presis malgrandajn rimarkojn pri la kunveno kaj neniam el ili estis kontraŭ Esperanto.

La kunveno de 14/26 de novembro elektis s-ron K. Ostanieviĉ kiel prezidanton de "Espero". La sama kunveno akceptis 10 novajn membrojn.

V. Rogaĉev-Antonov.

Membro de la Komitato de "Espero".

\* \* \*

Societo "Espero" ricevis por sia partopreno en la Ekspozicio tutmonda monoferojn de sekvantaj personoj: A. A. Zinoviev — 10 rubl., A. L. Vejtcler — 1 rubl. 80 kop. Kune kun antaŭa monofero = 40 r. 40 k.

\* \* \*

**La vortaro sveda-esperanta, verkita de L\*\*\*, la dua eldono, travigardita kaj pliigita de Paul Nylén; eldonita de la Klubo Esperantista Upsala. Kosto 0,60 kr.** Tiu ĉi verko estas nun presita kaj aĉetebla ĉe la Klubo Esperantista Upsala.

La formato estas tia sama kiel la vortaro Esp.-sveda. Ĝi enhavas proksimume 5,000 svedajn vortojn, tradukitajn en Esperanto. Ĉiuj svedaj kaj finlandaj esperantistoj certe kun vera ĝojo akceptos la sciigon, ke tiu ĉi verko, kiu jam dum tro longa tempo mankis, estas nun denove akirebla.

\* \* \*

**Eltiro el letero de finlanda esperantisto:** Jen mi volas rakonti al vi episodon, kiu montras, kiom malmulte oni scias pri Esperanto en certaj lokoj.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi skribis al firmo en Berlino, J. Hurwitz, por mendi iajn kaj tiajn uzilojn skribtablajn. Estas kompreneble, ke mi uzis por tio ĉi Esperanton, sed por esti certa pri kompreno, mi aldonis vortareton. Nu, mi ĝuste ricevis tion, kion mi deziris. Sed post paro da semajnoj mi skribis denove por sciigi pri la kosto de *Millitografo* kaj *Ciclostilo*, tiun ĉi fojon sur poŝtkarto, ankaŭ en Esperanto, sed *sen* vortareto. Post iom da tempo mi ricevis poŝtkarton en *franca* lingvo, per kiu ili petis, ke mi uzu la francan lingvon, ĉar ili havas grandan malfacilaĵon kompreni la — "*finnan*"!! — La konkludoj faras sin mem! Hodiaŭ estas sendita tien nova mendo, sed ankaŭ nun en Esperanto, ĉar mi certe ne intencas fari klopodojn nek kun germana nek kun franca lingvo. Nun mi uzas propagandajn kovertojn kaj en la letero mi tute simple admonas ilin lerni Esperanton. Ŝajnas al mi, ke ili povu do iom klopodi sian cerbon, kiam ili volas akiri monon.

\* \* \*

**Pri Esperanto parolis.** En "*Bergens Tidende*" N:o 354, sabato, 11:a de nov. — granda ĉiutaga gazeto, eldonata en Bergen, Norvegujo — estas presita, en la plej antaŭa loko, granda artikolo pri Esperanto, kiun verkis nia amiko s-ro Haldor Midthus (instruisto en Lysekloster, Bergen). La unua parto de la artikolo rakontas la historion de d-ro Zamenhof kiel la aŭtoro de Esperanto. En la dua parto estas priskribita la konstruo kaj ecoj de Esperanto, ĝia disvastiĝo kaj literaturo, la aprobaj kaj laŭdaj

prijuĝoj pri nia lingvo, kiujn faris konataj kaj gloraj homoj kaj institutoj. Fine per la tria parto la verkinto disvolvas la historion de la diversaj projektoj de lingvo internacia, montrante la preferojn de Esperanto rilate al ĉiaj ceteraj.

La bonega verkaĵo finiĝas kun la interesa kaj ĝojiga diro, ke norvega lernolibro de Esperanto sendube estos eldonita en la plej proksima estonteco.



## La produktaĵo de l' arto.

(Rakonto de Ant. Ĉeĥov).

Portante sub la brako ion, envolvitan en la 223:a numero de "Borsa Sciigaĵo", Aleksanĉjo Smirnov, sola filo ĉe sia patrino, faris acidan vizaĝon kaj eniris la kabineton de l' doktoro K.

— Ho, kara junulo! renkontis lin la doktoro. Nu, kiel vi sin sentas? Kion bonetan vi diros?

Aleksanĉjo palpebrumis je l' okuloj, almetis sian manon al la koro kaj diris per ekscitiĝita voĉo:

— Mia panjo, sinjoro doktoro, salutis al Vi kaj ordonis danki Vin... Mi estas sola filo ĉe la patrino, kaj Vi savis mian vivon... Vi sanigis min de danĝera malsano, kaj... ni ambaŭ ne scias, kiamaniere danki Vin...

— Trankviliĝu, junulo, haltigis lin la doktoro, ekflatita je l' danko. Mi faris nur tion, kion ĉiu alia farus, se li estus sur mia loko...

— Mi estas sola filo ĉe mia patrino... Ni estas homoj malriĉaj kaj, kompreneble, ni ne povas pagi al Vi pro Via penado, kaj... kaj la konscienco ne permesas al ni, ho doktoro, ... kvankam, cetere, mia panjo kaj mi... sola filo ĉe la patrino... ni konvinke petas Vin alpreni kiel la signo de nia danko... jen tiun ĉi objekton, kiu... la objekto estas de tre granda indio, el antikvega bronzo... malofta produktaĵo de l' arto...

— Tio ĉi estas superflue! sin sulkigis la doktoro, por kio tio ĉi?

— Ne, mi petas Vin, Vi jam ne rifuzu, daŭrigis murmuris Aleksanĉjo, disvolvante la kunvolvon. — Vi ofendos per via rifuzo min ankaŭ kiel mian panjon... La objekto estas tre bonega... el antikvega bronzo... Ĝi estas forlasita al ni post la mortinta patreto kaj ni gardis ĝin kiel karan memoron... Mia patreto aĉetadis antikvan bronzon kaj vendadis ĝin al amantuloj... Nun la panjo kaj mi ne okupadas nin je tio...

Aleksanĉjo divolvis la objekton kaj solene starigis ĝin sur la tablo. Tio ĉi estis nealta kandelingo el antikva bronzo, arte farita. Ĝi prezentis grupon: sur submeto staris du virinaj figuroj en kostumoj de l' Evo kaj havantaj manierojn, kiujn priskribi mi havas nek kuraĝecon nek decan temperamenton. La figuroj kokete ridetis kaj entute havis tian eksterajon, ke, ŝajnas, se ilin ne detenus la ŝuldo subtenadi la kandelington, ili nepre desaltus de la submeto kaj faru en la ĉambro tian petolaĵon, pri kia, ho leganto, estas nekonvene eĉ ekpensi.

Ekrigardinte la donacon, la doktoro malrapide kombis sin apud la orelo, ektusegis kaj nedecideme purigis la nazon.

— Jes, efektive, la objekto estas bela, murmuris li, sed... kiel tion esprimi... ĝi astas tro neliteratura... Tio ĉi estas ne sole nudigita mamoo, sed — diablo scias — kio estas...

— Kial?

— Malpure... Ja meti sur tablo similan artaĵon — tio signas la tutan loĝejon malpurigi!

— Kiel Vi, sinjoro, strange rigardas pri arto, tio estas eĉ ofendeble, diris Aleksanĉjo. — Ja tio ĉi estas arta objekto, Vi ekrigardu! Tiom da beleco kaj estetikeco, ke estimega sento plenigas la animon kaj larmoj malvastigas la gorĝon! Kiam oni vidas tian belecon, oni forgesas ĉion teruman... Vi rigardu, kiom tie ĉi estas da movado, kia maso da aero, da esprimeco!

— Mi bonege komprenas ĉion tion ĉi, mia kara, haltigis lin la doktoro, sed ja mi havas la familion, ĉe mi tie la infanoj kuradas, la sinjorinoj estadas...

— Kompreneble, se rigardi de la punkto de vido de l' amaso... diris Aleksanĉjo, kompreneble, ke tiu ĉi altarta objekto aperas en alia lumigo... Tamen, doktoro, estu Vi pli supre ol la amaso, des pli, ke per Via rifuzo Vi profunde malĝojigos min kaj mian panjon... Mi estas sola filo ĉe la patrino... Vi savis mian vivon... Ni fordonas al Vi la plej karan por ni objekton, kaj... mi bedaŭras nur, ke Vi ne havas alian tian saman objekton kiel la paro por tiu ĉi kandelingo...

— Mi dankas, mia kara, tre dankas... Salutu al Via panjo, sed, je Dio, Vi mem juĝu, ja ĉe mi tie la infanoj kuradas, la sinjorinoj estadas... Nu, cetere, ĝi restu! Al Vi ja tion oni ne povas komentariigi.

— Komentarii do oni ne devas! ekĝojis Aleksanĉjo. La kandelington Vi starigu tie, jen flanke je la vazo... Kia estas domaĝo, ke Vi ne havas alian tian saman kandelington. Nu, adiaŭ, sinjoro doktoro.

Post la foriro de Aleksanĉjo, la doktoro longedaŭre rigardis la kandelington, kombis sin apud la orelo kaj meditis.

“La objekteto estas tre bonega, nedisputeble“, pensis li, — “kaj forĵeti ĝin estas domaĝe... restigi do ĝin ĉe si estas neeble... Jen embaraso!... Ĉu oni ne povas, cetere, al iu ĝin donaci aŭ oferi?...“

Longtempe meditante, li fine rememorigis sian bonan amikon, advokaton U., al kiu li estis ŝulda pro kondukado de afero.

— Tre bonege, decidis la doktoro. Al li, kiel mia amiko, la konscienco ne permesos preni de mi monon, kaj tio estos tre konvene, se mi donacos al li ian objekton... Jen, mi prezentigos al li tiun ĉi diablaĵon! Ĝustatempe li estas fraŭla kaj facilanima...

Ne demetante la aferon, la doktoro sin vestis, prenis la kandelington kaj veturis al s-ro U....

— Estu sana, amiko! diris li, trovinte la advokaton hejme... Mi al Vi... alvenis por danki, mia kara, pro Viaj penadoj... Ĉar la monon Vi ne volas preni, almenaŭ akceptu jen tiun ĉi objekteton... jen, mia kara... La objekteto estas luksa!

Vidante la objekteton, la advokato enfalis en nepriskribebla ravo.

— Jen estas artifiko! ekridegis li. Ho ve, diabloj, jen oni devas do elpensi tian artifketon! Mirinde, ĉarme! Kie Vi ricevis tian belecon?...

Elverŝinte sian ravon, la advokato timeme ekrigardis al la pordoj kaj diris:

— Nur Vi, mia amiko, forprenu vian donacon. Mi ne prenos ĝin...

— Kial? ektimis la doktoro.

— Tial do... Ĉe mi tie ĉi estadas la patrino, la klientoj... kaj krom tio... estas hontinde antaŭ la servantoj...

— Ne, ne... Ne kuraĝu pretekstigi kaj rifuzi! svingis je l' manoj la doktoro. — Vi volas min ofendi... Rigardu nur, kia estas arta objekto... Kiom da movado... esprimeco... Mi eĉ paroladi ne volas...

— Eĉ se tio estus ŝmirita aŭ figaj folietoj estus surmetitaj...

Sed la doktoro ankoraŭ pli forte svingis je l' manoj, elsaltis el la loĝejo de U. kaj kontenta, ke li povis liberiĝi de la donaco, reveturis hejmen...

Kiam li foriris, la advokato pririgardis la kandelington, ektaŭsis ĝin per la fingroj el diversaj flankoj kaj, ankaŭ kiel la doktoro, longtempe pripensadis la demandon pri tio, kion fari kun la donaco?

"La objekto estas bela", konsideris li, "forĵeti ĝin estas tre domaĝe, sed havi ĝin hejme estas tute nekonvene... Plej bone estus prezentigi ĝin al iu... Ha, ĉu oni ne povas hodiaŭ vespere prezentigi tiun ĉi kandelington al la komediisto Ŝ. Li, kanajlo, amas similajn artetaĵojn kaj ĝustatempe hodiaŭ li festas sian benefizon..."

Dirita — farita. Vespere, peneme envolvita, la kandelingo estis prezentigita al la komediisto Ŝ.

Dum la daŭro de la tuta vespero la tualetejo de l' komediisto estis sieĝadata per viroj, alvenintaj kun plezuro rigardi la donacon. En la tualetejo senĉese estis aŭdata la ravita bruo kaj ridego, komparebla al ĉevala bleko... Se ia aktorino, venante al la pordo, demandadis: "ĉu oni povas eniri?", tuj estis aŭdata la raŭka voĉo de l' komediisto:

— Ne, ne, sinjorineto, mi estas malvestita!

Post la fino de l' teatra prezentado la komediisto levadis la ŝultrojn, disstarigadis la manojn kaj parolis: Kien mi metos tiun ĉi abomenaĵon? Ja mi loĝas en privata loĝejo! Ĉe mi la aktorinoj estas! Tio ne estas fotografaĵo, kiun oni povus ekkaŝi en la tablon.

Vi do, sinjoro, vendu ĝin, konsilis la frizisto, senmaskigante la komediiston. — Tie ĉi en la antaŭurbo loĝas unu maljunulino, kiu aĉetas antikvan bronzon... Vi veturu kaj demandu sinjorinon Smirnov'... Ŝin ĉiu scias.

La komediisto obeis...

Du tagoj poste la doktoro K. sidis ĉe ŝi en la kabineto kaj, almetinte la fingron ĉe la frunto, pensis pri galaj acidoj.


Neatendite la pordo estas malfermita kaj en la kabineton enkuris Aleksanĉjo Smirnov'... Li ridetis kaj la tuta lia figuro spiris je feliĉo...

En la manoj li tenis ion, envolvitan en gazeto.

— Sinjoro doktoro! komencis li, malfacile spirante, mi tre ĝojas! Por Via feliĉo ni havis prosperan okazon akiri alian kandelington, similan kun tiu, kiun Vi jam havas!... Mia panjo estas tiom feliĉa... Mi estas ja sola filo ĉe la patrino... Vi savis mian vivon... Kaj Aleksanĉjo, tremante pro sia sento de danko, starigis antaŭ la doktoro la kandelington.

La doktoro malfermis la buŝon, volis ion diri, sed li nenion diris: lia lango estis paralizita...

Tradukis el rusa lingvo K. Ŝidlovskij.



## Genia komediisto.

Rakonto, tradukita el pola lingvo per A. Zakrĵevski.

*Ave Cæsar, ave!* — ripetadis multaj voĉoj en la Roma amfiteatro.

*Ave Cæsar,* lumo de Romo, patro de la popolo, *ave! ave!*

Sed Cæsar, ŝajne ne rimarkadis la kriojn: malŝateme sidis li en la seĝo kaj senpenseme rigardadis antaŭ si, kiel subite el la loĝio "*domini gregis*"

defalis sur la arenon la peceto de purpura ŝtofo: tio ĉi estis la signo por la komencado de l' amuzoj.

Majesta vidaĵo!

En la amaso de polvo malaperadis la veturigistoj hele vestitaj, puŝante unu la alian en la furioza kuro; grandega "velarium" estis alte super la areno, kaj la ravita popolo sin levadis el siaj lokoj, elvokante la venkintojn.

Tio ĉi estis nur la unua parto de la amuzoj; post ĝi estis promesitaj vetbataloj de gladiatoroj kaj bestiarioj, aldonate ke kelkaj homoj el la kristana sekto estos disŝirataj per la sovaĝaj bestoj.

Tiuj ĉi sektanoj estis kaptitaj en siaj noktaj superstiĉaj praktikoj.

Sed fine estis malfermitaj la pordegoj de la kaĝoj kaj la leono kaj poste la tigro kaj la pantero elkuris la arenon.

La bestoj, kvazaŭ ektimigitaj, ne elmontradis la deziron je la batalo, la krio de la amaso timigis ilin, timeme staradis ili ĉirkaŭ la muroj. Fine la tigro faris kelkajn saltojn flanken, la pantero komencis ĉirkaŭradi kaj flaradi la arenon, sola nur la leono trankvile kuŝis sur la sablo, levante iam post iam, fiere sian kolharan kapon.

Sed jen ekkrakis la kraĉoj de la "vomitorium" kaj al la okuloj de la publiko aperis malgranda ĝibulo.

Ĉiuj ekkonis lin: tiu ĉi ĝibulo estis *Marcus Rufus*, konata komediisto kaj favorato de la roma publiko. De longe jam oni lin ne vidis, ĉar li malaperis jam de kelkaj jaroj.

Kio estis farita kun li, neniu sciis; unuaj pensadis, ke li fariĝis riĉa kaj loĝas en la provinco, aliaj — ke li edzigis k. t. p., sed tio ĉi nur estis supozoj. Je la komenco ofte oni demandadis pri li, sed fine ĉiuj forgesis lin; kaj jen denove tiu ĉi *Marcus Rufus* je propra persono aperas antaŭ la okuloj de Romo.

"*Marcus Rufus! Marcus Rufus!* brave!" — ripetadis la kriema amaso en la amfiteatro. La komediisto trankvile ĉirkaŭrigardis la apudestantojn; io neordinara estis vidata en la esprimo de lia vizaĝo. Ĉiuj kun malpacienca atendadis ian genian ŝercon, sed la komediisto, silentanta, iris malrapide al la mezo de la areno.

La supraj vicoj de l' amfiteatro amuziĝis nur pri lia malgranda figuro; sonis laŭta rido kaj "brave". La komediisto haltis, ĉirkaŭrigardis la amason kaj denove iradis plu.

— Senkompara! genia! — oni ripetadis en la loĝioj, kaj en la supraj vicoj la popolo fervore aplaŭdis kaj ridis.

— Silentiĝu! — paroladis oni el malsupre. — *Marcus* volas paroladi!

La rido kaj la krio silentiĝis sed jen ankoraŭ sin renovigis.

— Silentu do fine! Permesu al li paroladi! — kriadis oni el ĉiuj partoj.

Por tio respondis la leono, skuante per la kolharoj ĝi ĉirkaŭiris la arenon kaj rimarkinte la rigardantajn sur si okulojn de Rufus — haltis antaŭ li, kiel enfosita.

La tigro ekkriegis terure, la pantero kuŝiĝis...

— Brave! ni ekvidos la dresecon de la sovaĝaj bestoj, brave, Rufus!

La bestoj ektimigitaj per la furioza krio, ne komprenadis kio fariĝas ĉirkaŭ ili. Rufus movadis per la lipoj; fine eksonis la kanto de la kristanaj turmentitoj.

— Kantu, kantu, Rufus! — kriadis la amaso, esperante ekaŭdi humoran parodion, elridantan la preĝon de la konfesantaj Kriston.

La tigro per sia kriego supersonis la krion de l' amaso, sed Rufus prokrastis kaj ne malhelpis kantadi la kanton... ripetiĝis la terura kriego... ankoraŭ unu momento de rido kaj de atendo... subite la bestoj ĵetis sin sur la komediiston kaj komencis disŝiri lian korpon — — — — —

Post la finintaj amuzoj, oni sin puŝis amase apud la amfiteatro ĉirkaŭ la portiloj kaj veturiloj.

— Kia majesta penso! — parolis bela patricino al la akompanantoj. — Ne antaŭsciigi nin, ke la komediisto fariĝis kristano! Eĉ la dia Cesaro estis en tre bona humoro.

— De longe ni ne vidis tian vidaĵon! parolas la senatanoj.

— Sole Romo povis havi la komediiston, kiu por gajigi la dian imperiestron fariĝis kristano kaj sin fordonis por la disŝiro al la bestoj.

Cesaro ordonis la maskon de Rufus ornami per florkrono, je rekompenco, ke li gajigis la Cesaron per sia genia ŝerco. — — — — —

En la malfrua nokto iaj homoj prenis inter la malvivuloj la korpon de Rufus kaj forportis ĝin en la katakombojn.



### Epigramo.

Amiko, pensas vi, ke esti povas  
Sur tiu bela stel' feliĉ' la vera? —  
Ho, eble kreitaj' sur ĝi sin trovas  
Pensanta tiel pri la mondo tera!

Sigurd Agrell.

## ANONCOJ.

 **N. O. Lindbäck,**   
juvelisto en Luleå (Svedujo),

rekomendas sekvantajn laplandajn ornamojn:

**Zono** el ledo kaj drapo por viroj kun 18 grandaj arĝentaj surornamoj, prezo: de 40 ĝis 130 kronoj.

**Zono** el ledo kaj drapo kun 20 arĝentaj surornamoj, prezo: 20 ĝis 100 kr.

**Kulero** el arĝento, " 8—16 "

**Pipo** el arĝento, " 10—16 "

**Broŝo** el arĝento, " 3—20 "

**Horloĝa ĉeno** el arĝento por viroj,  
prezo: 8 kr.

**Tia sama por virinoj,** " 6 "

**Ringo** el arĝento por virinoj, " 3 "

" " oro, prezo 15—20 "

Monon oni povos sendi plejbone en franca, germana, sveda kaj angla papera mono aŭ per poŝta mandato.

Ĉiujn artikolojn mi sendas en rekomendata letero.

**N. O. Lindbäck.**

Adreso: Luleå (Svedujo).

Ĉe la **Klubo Esperantista en Upsala** estas aĉeteblaj:

**La literaturisto kaj lia fianĉino.** Rakonto de Emelie Flygare-Carlén. Tradukis **Otto W. Zeidlitz.** Kostas 65 centimojn.

**Du Mirrakontoj** de **Otto W. Zeidlitz.** Kostas 40 centimojn.

**Jarlibro Esperantista 1897,** eldonita de la **Societo "Espero" en S. Peterburgo.** Kostas 1 frankon.

Ankaŭ alian literaturon esperantan oni povas akiri ĉe la Klubo Esper. Upsala, kiel ankaŭ ĉe D:ro Zamenhof.

### La kumiso-eksport'

neniam difektiĝas. Oni povas ĝin ricevadi dum la tuta jaro. Broŝuro (en rusa lingvo) oni ricevas senpage. Adreso: St. **Smyŝ-ljaevka** Samaro-Zlatoust, ĵel. dor. Al s-ro **B. Postnikov.**